

ESPERANTISTO.

Gazeto de la lingvo internacia „Esperanto“.

Zeitschrift für die internation. Sprache „Esperanto“. Gazette de la langue internationale „Esperanto“.

Eldonata unu fojon en la monato de **L. Zamenhof** kaj **W. H. Trompeter** sub la redakcio de **L. Zamenhof**.

Kosto por jaro (kune kun poŝta traŝendo) 2 frankoj (= 1 marko 60 pfenigoj 80 kopekoj). Kiu alsendas la pagon por 10 ekzempleroj, ricevas 1 ekzempleron senpage. Anoncoj po 5 centimoj por duonpaĝa milimetro alteco da spaco.

Kun ĉio tuŝanta la administracion de „La Esperantisto“ (abonoj, anoncoj, ŝanĝo de la adresoj, plendo pri nericevado de numeroj k. t. p.) oni volu sin turni al **W. H. Trompeter** à **Schalke**, Westfalie, Allemagne.

Kun ĉio tuŝanta la redakcion de „La Esperantisto“ (korespondoj, artikoloj, sciigoj, demandoj k. t. p.) oni volu sin turni al **Dr. L. Zamenhof** à **Varsovie**, Russie. (Li akceptas ankaŭ abonojn.)

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de **Heerdegen-Barbeck** en **Nurnbergo**.

No. 5.

Nurnbergo, Majo 1892.

Jaro III.

De la administracio.

De la numeroj 2 kaj 3 ni ne havas pli ekzemplerojn. Tial ni ne povas ilin sendi al novaj abonantoj. Kiu postulas anstataŭ tiuj ekzemplerojn de No. 1 (kiu ekzistas en stereotipoj) por propagando, al tiu ni volonte sendus ilin. Aliaj novaj abonantoj estas petataj sendi nur $\frac{5}{6}$ de la abona pago. N-on 4 ni jam presis en pli granda nombro (500 anstataŭ 400). Ni intencas en unu el la numeroj de 1892 presi la nomojn de la abonantoj; tial ni petas ĉiujn abonantojn, kiuj abonis ne rekte ĉe ni aŭ ĉe d-ro Zamenhof, sed per ia libristo aŭ klubo, ke ili havu la bonecon sendi al ni siajn adresojn.

Ŝanĝotaĵo.

Al la ŝanĝoj, kiuj estis proponitaj de multaj amikoj kaj laŭ nia opinio estas prove akceptindaj sur kondiĉoj esprimitaj en nia artikolo en la No. 4 (t. e. por prova privata uzado ĝis la tempo montros ilian indon aŭ neindon), ni devas ankoraŭ aldoni la ŝanĝon de la tabelo da interrilataj pronomoj kaj adverboj („kiu“, „tiu“, „kiam“ k. c.). Estante vortoj tre gravaj kaj uzataj sur ĉiu paŝo pli ol ĉiuj aliaj vortoj, ili ofte malhelpas per sia longeco kaj multe gajnas, se ili estus kiel eble plej mallongaj. El la diversaj formoj, kiujn oni proponis al ni, ni elektas la sekvantan, kiu sola donas al ni la eblon prepari iom post iom formojn novajn, ne rompante la malnovajn, t. e. perfektigi la lingvon sen arbitraj ŝanĝoj kaj en la spirito de perfektigoj en ĉiu alia lingvo. Ni proponas eljeti en la dirita tabelo da vortoj la literon „i“ kaj (por ke ne naskiĝu io tute nova) anstataŭigi ĝin per apostrofo. La apostrofo en la unua tempo eble prezentos ion neoportunan, sed ili prezentos sendanĝeran ponton de transiro, kaj ni ne devas bruligi post ni tiun ĉi ponton, antaŭ ol venis la ĝusta tempo. Kiam la apostrofitaj formoj tute forte

enradikiĝos kaj tute elparos la formojn malnovajn, tiam la apostrofoj forfalos, kaj ni tiam havos novajn formojn naskitajn per vojo tute natura kaj absolute sendanĝera. Ni sekve proponas la sekvantajn provajn (dume nur permesatajn sed ne devigajn) formojn: „ia, ial, iam, ie, iel, ies, io, iom, iu; k'a, k'al, k'am, k'e, k'el, k'es, k'o, k'om, k'u; t'a, t'al, t'am, t'e, t'el, t'es, t'o, t'om, t'u; ĉ'a, ĉ'al, ĉ'am, ĉ'e, ĉ'el, ĉ'es, ĉ'o, ĉ'om, ĉ'u; nen'a, nen'al, nen'am, nen'e, nen'el, nen'es, nen'o, nen'om, nen'u“. La vortoj „k'e, ĉ'e, ĉ'u“ fariĝas tiel tute similaj je la vortoj „ke, ĉe, ĉu“, kiuj havas jam alian signifon; tamen tio ĉi ne malhelpas: en la skribado Vi ilin facile diferencigos per ilia apostrofo, en la elparolado — per ilia uzo kaj pliforta akcento. Se iam ili estos tiel sendube akceptitaj, ke ili perdos la apostrofon, ili povos tiam por diferenco havi sur si skribitan akcenton: „ke“ (mallonge) kaj „ké“ (longe). Cetere, se tio ĉi ŝajnos neoportuna, tiam sendube fariĝos la sekvanta fakto: ĉiuj vortoj de la tabelo kun la tempo akceptos la formon novan kaj la vortoj „kie, ĉie, ĉiu“ restos kun la formo malnova. Al tio ĉi ni memorigas, ke ni ĉiam parolas pri la perfektigado de nia lingvo en la nunaj cirkonstancoj; sed kiam la celo de la lingvo (komuna akceptiteco) estos jam atingita, tiam estonta aŭtoritata Akademio povos forlasi nian vojon kaj fari aliajn ŝanĝojn eĉ tute arbitrajn kaj rompantajn.

La formoj kun „ĉi“, „tiu ĉi, tie ĉi“ k. c. estas maloportunaj per tio, ke ili ne permesas la formadon de adjektivoj kaj aliaj partoj de parolo; por forigi tiun ĉi ŝajnan maloportunaĵon, ni, anstataŭ enkonduki ion novan, montras nur, ke laŭ la reguloj de nia lingvo ni povas uzi ne sole „tie ĉi“, sed ankaŭ „ĉi tie“, el kiu ni jam tre bone povas fari „ĉitica“ (aŭ „ĉi-tica“).

La mallongeco de la interrilataj pronomoj kaj adverboj estas aparte grava por la versistoj. Sed ĉar la versistoj ankaŭ en aliaj lingvoj permesas al si mallongigojn, ne uzatajn en prozo, kaj la versoj per si mem prezentas ne ion necesan, sed pli ĝuste lukson, tial ni por versoj kredeble akceptos la provan uzadon de la apostrofitaj formoj (nur en okazo de bezono) ankaŭ en la „Esperantisto“ eĉ pli frue, ol ili ricevos komunan sankcion.

En unu el la sekvantaj numeroj ni parolos pri la diferenco inter „kiu“, „kia“ kaj „kiela“ kaj laŭ la deziro de kelkaj amikoj ni iom ŝanĝos, klarigos kaj pli severe diferencigos la uzadon de tiuj ĉi formoj.

Novajoj.

La 15an de Aprilo ni ricevis telegramon el S. Peterburgo de la klubo „Espero“, ke la ministro de l'internaĵo aprobis la regularon kaj oficialigis la ekzistadon de la societo „Espero“. Ni povas nun sekve labori en Rusujo kuraĝe kaj publike kaj ni esperas, ke baldaŭ fondiĝos en Rusujo multaj lokaj kluboj kiel filioj de la societo „Espero“. Koran gratulon al la societo „Espero“ kaj al ĝiaj energiaj membroj. De la laboroj de la „Espero“ ni multon atendas por nia afero.

Videble nia afero havas kelkan feliĉon. Sep membroj de la S. Peterburga klubo „Espero“ aĉetis kune 10 kuponojn (po 1 rublo) de la bonfara loterio kun la decido, ke 30 % de la eble elironta gajno iros por la kaso de la klubo. Ili efektive gajnis 50 rublojn, kaj tiel la kaso ricevis 15 rublojn.

La farmaciisto s-ro A. Zambrzycki (Cvijetnóĵ Bulvar, dom Maljuŝiniĥ, kv. No. 41, Moskva) intencas fondi rondeton esperantistan en Moskvo; por tiu ĉi celo li petas, ke niaj Moskvaj amikoj, kiuj deziras partopreni en la rondeto, volu sendi al li siajn adresojn.

Al la festo de Pasko s-ro V. Ŝmurlo el S. Peterburgo presis gratulajn kartojn en la lingvo Esperanto kaj dissendis ilin al siaj amikoj kaj konatoj. Ni rekomendas tiun ĉi ekzemplon por similaj okazoj al aliaj amikoj.

S-ro Martakov proponas, ke la esperantistoj havu en siaj ĉambroj kartojn kun grandlitera surskribo (en lingvo nacia) „Lingvo internacia Esperanto“. Al la dezirantoj ni povas doni tiajn kartojn, sed ni pensas, ke estus tute sufiĉe, se, anstataŭ kartoj, la amikoj havus sur siaj tabloj ĉiam kelkajn ekzemplerojn de lernolibroj esperantaj. Li proponas ankaŭ, ke la amikoj kolektu necesan sumon por eldoni en lingvo rusa „Kalendaron-Esperanto“ por 1893. Laŭ nia opinio estus tre bone, se iu volus private eldoni tian kalendaron kaj havus la eblon disvastigi ĝin en grandega nombro; sed kolektadon de mono por tiu ĉi celo ni ne trovas utila, ĉar anstataŭ perdi monon por nova presado, la eldonanto povus uzi la jam ekzistantajn malkarajn lernolibrojn (NN-o 41, 43, 52, 53) kaj simple aldoni al ili alian kovrilon kaj alpresi al ili 12—20 paĝetojn da kalendaraj sciaĵoj. La plej grava demando estas: kiel ilin disvastigi en granda nombro?

En la fino de Marto s-ro Chr. Schmidt havis 1 $\frac{1}{2}$ -horan publikan parolon pri nia lingvo en la societo de komercistoj en Erlangen. Li parolis pri la ĉefaj problemoj de lingvo internacia kaj montris, en kia maniero nia lingvo solvis tiujn ĉi problemojn. Post klarigo de la gramatiko la parolanto prezentis al la astantoj diversajn leterojn en nia lingvo kaj montris ilian facilan kompreneblecon sen prepariĝo. Nun s-ro Schmidt skribas al ni, ke en Erlangen jam fondiĝis klubo Esperantista. La nomon kaj adreson de la klubestro ni presos tuj kiam ni ĝin ricevos. S-ro Schmidt skribis al ni ankaŭ, ke li intencas havi publikan parolon en la urbeto Königsberg en Sachsen-Koburg-Gotha.

Kiel ekzemplon de facileco de la lingvo Esperanto s-ro V. Langlet el Börrum skribas al ni, ke li sendis lernolibron esperantan al unu sinjorino en Filipstad kaj baldaŭ ricevis de ŝi dankleteron esperante skribitan post duonhoru de lernado kaj preskaŭ seneraran.

S-ro Martakov petas nin sciigi, ke al la societo de la „Esperantistoj-anoncantoj“ aliĝis s-ro W. H. Trompeter el Schalke kun pli ol 3 anoncoj ĉiujare en germanaj gazetoj.

Eliris el la presejo la promesitaj 2 novaj tre gravaj verkoj: No. 52. „The Universal Language Esperanto. Complete Instruction-Book with two Vocabularies, translated after the Russian of Dr. L. Samenhof by R. H. Geoghegan. Published by W. H. Trompeter in Schalke, Westfalen, Germany“; No. 53. „Manuel Complet de la Langue Internationale

Esperanto avec double accent, par L. de Beaufront en Epernay“. Ambaŭ verkoj (kiuj estas ĉiuj ĉi artikoloj kaj artikoloj) estas analogiaj je la verkoj No. 41 kaj 43; la libro de s-ro de Beaufront ekster tio enhavas ankoraŭ multajn klarigojn kaj penis enpreni en sin ĉion, kio povas esti necesa por la francaj lernantoj de nia lingvo. La verkoj havas belan eksteraĵon kaj preskaŭ seneraran internajon. Ni varmege rekomendas tiujn ĉi verkojn al niaj amikoj, kaj ni forte dezirus, ke ili disiru en la mondon en kiel eble plej granda nombro.

La manuskripto de la portugala lernolibro de nia lingvo (de s-ro J. H. Ferreira) estas jam pretaj kaj oni jam komencis ĝin presi.

S-ro S. Goldberg el Varsovio preparis poŝan lernolibron de nia lingvo kun 2 vortaroj (analogie je la verko No. 41) en lingvo pola. La verko estos presata laŭ kondiĉoj esprimitaj en No. 1 de nia gazeto, tuj kiam la necesa mono kolektiĝos.

S-ro A. Grabowski sciigas nin, ke li intencas eldoni verketon sub la titolo „La Libro Esperanta“, kiu enhavos kolekton da diversaj versajoj, kiuj aperis en nia literaturo ĝis nun, kaj ankaŭ diversaj versajoj novaj. Tiun ĉi ideon naskis ĉe li la rimarkita fakto, ke la belaj versoj en nia lingvo prezentas tre efikan rimedon de propagando.

Disvastiĝis la sciigo, kvazaŭ la aŭtoro de la lingvo Esperanto mortis; li rapidas nun tial certigi la karaju malamikojn de nia afero, ke li ankoraŭ vivas.

De la mono, kiun ni siatempe ricevis por „Akcioj“, „Kartoj Fondantaj“ aŭ por nia gazeto laŭ ĝia malnova kosto, la sekvantaj sumoj restis ĝis nun ne reprenitaj kaj iras, laŭ la deziro de la donintoj, por la celoj de nia afero: de s-ro A. Zinovjev el Feodosia — (resto) 45 rubloj 20 kopekoj; de d-ro D. Marignoni el Crema — 2 rubloj; de s-ro kaj s-rino Zoroastrov el Savinka — 2 rubloj; de s-ro A. Sirotin el Kiev — (resto) 1 rublo; de s-ro A. Jasinski el Kiev — (resto) 1 rublo; de s-ro J. Jarmoĥoviĉ el Zlatopol — 1 rublo; de s-rino M. Karovina el S. Peterburgo — 1 rublo; de s-ro K. Portnov el Bikovo — 1 rublo; de s-ro L. de Beaufront el Epernay — (resto) 1 rublo 10 kopekoj; de s-ro K. Hübert el Aleksandrovska — (resto) 1 r. 20 kop.; de s-ro E. Haller el S. Peterburgo — (resto) 1 r. 20 kop.; de s-ro J. Puĉkovski el Kjahta — (resto) 1 r. 20 kop. Ekster tio ĉi ni en la lasta tempo ricevis por la celoj de nia afero: de s-ro A. Grabowski el Ivanovo Vozneŝensk — 10 rublojn; de d-ro D. Marignoni el Crema (per la administracio de nia gazeto) — 1 rublon 60 kop. — Ĉio kune 70 rubloj 50 kopekoj — Kune kun la mono, kiu restis ĉe ni de antaŭe (enkalkulinte la 60 rublojn de s-ro Puĉkovski), ĝi faras nun la sumon de 158 rubloj 37 kopekoj.

S-ro V. Terentjev el S. Peterburgo alsendis al ni tutan kolekton da diversaj gazetoj, en kiuj estis parolite pri nia afero; ekster diversaj gazetoj, pri kiuj ni jam siatempe parolis, ni en la kolekto trovis ankoraŭ: „S. Peterburgskij Listok“ No. 308, „S. P. L.“ No. 309, „S. P. L.“ No. 310, „S. P. L.“ 313 (2 pecoj), „S. P. L.“ No. 321, „S. P. L.“ No. 329, „Novosti“ No. 5, „Russkaja Ĵiznj“ No. 216, „R. Ĵ.“ No. 253, „R. Ĵ.“ No. 260, „R. Ĵ.“ No. 304, „S. Peterburgskaja Gazeta“ No. 318, „S. P. G.“ No. 323, „Rodina“ No. 47, „Rodina“ No. 51, „Ŝut“ No. 46.

(2 pecoj). Ĉiuj tiuj ĉi gazetoj enhavas diversajn artikolojn pri nia lingvo kaj afero, grandajn kaj malgrandajn, seriozajn kaj humorajn, en prozo kaj en versoj, malgrandajn sciigojn, respondojn de la redakcio k. t. p. Al s-ro Terentjev ni esprimas nian koran dankon. — Ekster la diritaj gazetoj ankoraŭ la sekvantaj gazetoj parolis pri nia afero: „Strekoza“ No. 46 kaj No. 48 [J. Puĉkovski], „Augsburger Abendzeitung“ No. 87 (pri la parolo de s-ro Schmidt en Erlangen) [Chr. Schmidt]. La administracio de nia gazeto donas nun ankaŭ anoncojn en la „Industrie“ (Berlino).

La sekvantaj novaj personoj deziras korespondadi en Esperanto: A. Bayer, Jan Janowski (str. Zelazna No. 45, m. 11, Warszawa), G. H. Backman, O. Berg, W. Strömberg, A. J. Petersson, M. Kihlberg, H. Nylén, M. Selldin, C. Andersson, H. Procopée, T. Matheson, R. Broman, M. Sjöstrand, H. Kindvall, K. Gumelius, O. Ohlsén, A. Germundsson. Iliajn adresojn oni trovos en la adresaro.

La Klubo Esperanta en Göteborg skribas al ni, ke la manuskripto de la nova sveda lernolibro de nia lingvo jam estas preta, kaj ili per subskribo komencis kolekti la monon, kiu estas necesa por la presado (ĉirkaŭ 300 kronoj). La titolo de la libro estas: „Fullständig lärobok i verdensspraket Esperanto jemte tva ordböcker“. La kosto estos 60 öre (= 80 centimoj). En la lasta letero, ricevita la 18an de Aprilo, la klubo sciigas nin, ke la libro jam estas presata kaj baldaŭ eliros.

Sinjoro de Beaufront skribas al ni: Epernay, 6 Aprilo, 92. Kara Sinjoro! La manko absoluta de tempo min devigis resti longe silenta kontraŭ Vi, en la du lastaj monatoj. Sed mi volas kredi, ke Vi ne rigardis tiun paŭzon kiel signo de malvarmiĝado aŭ de forgeso, tuŝante la propagandon de nia amata lingvo en mia patrujo. Anstataŭ intenci ripozon, mi preparas la efektivigon de l'plano, kiun mi elvolvis al Vi, en la komenco de la pasinta jaro. Por tio mi senpacience atendas la nun baldaŭan eliron el la presejo de l' Poŝa Lernolibro por Francoj ĉar sen ĝi mi havas la manon ligitan. Eble kelkaj amikoj bedaŭras, ke ili ne vidas pli da nomoj francaj inter la personoj, kiuj ellernis la lingvon. Eble ankaŭ ili kulpigas en sia koro la viron, kiu skribis tiel ardore kaj faris tiel mole. Sendube ili pensas: „kiam oni estas en tia grado entuziasma, oni agadas pli energie, oni altiras pli da homoj, oni skribas pli da artikoloj tuŝante la aferon; per unu vorto, oni ne permesas, ke sia patrujo tenu la lastan lokon en demando tiel grava“. Ili estas tute pravaj, kaj mi ankaŭ kredeble pensus kiel ili, en tia sama okazo. Tial mi konscias, ke mi ŝuldas klarigon, pri mia ŝajna senfareco, al ĉiuj, kiuj legis mian volenan promeson al Vi en la suprediritaj leteroj. Ĉar laŭ mia juĝo mem, la preparado de l' Poŝa Lernolibro ne estas sufiĉa motivo de apatio por la propagando de nia sankta afero. Mi efektive komencis la disvastigon, sed apenaŭ mi estis skribinta du artikolojn kun sufiĉe granda nombro da leteroj, mi ricevis de ĉie du specojn de rimarkigoj, kiuj konkludas per la sama maniero. Unuj diris: „certe la folio-vortaro estas sufiĉa por ekkoni, pli aŭ malpli bone, la simplecon de la lingvo; kun ĝi oni povas kompreni ĉion, sed kun ĝi sola estas tro mal-

oportune, tro malfacile diri aŭ skribi, kion oni volas. Se, danke la unuan broŝuron kaj la „Duan Libron“, homo instruita povas ellerni la lingvon, la aliaj ne povas kaj certe ne volos. Verku do, unue, libreton facilan, kun duobla vortaro, kun la reguloj aŭ rimarkoj nature postulataj de la patra lingvo komparata eĉ je la plej ideale facila lingvo; faru tian libron, kaj ni kun plezuro aliĝos al Vi“. La aliaj diris: „Estas danĝere por la ideo mem Vin prezenti antaŭ la franca publiko kun materialo, ne permesanta bone juĝi la karakteron kaj indecon de Esperanto. Volapük jam senkreditigis eĉ ni la demandon, per ĝia fiasko kaj ridindeco; Vi ja riskas, ke oni ne diferencigu Vin bone de tiu sovaĝa sistemo. Vi scias, ke ordinare oni konfesas sufiĉe da spirita precizeco eĉ miaz kunpatrujanoj; sed ĝuste pro tio estas timinde, ke la plejmulto vidu en la ŝajna nepleneco de l' lingvo ne fakton okazan (rezultantan el manko de libro sufiĉa kaj france tradukita), sed difekton esencan. Tiam la malamikoj kun la mokistoj uzos lerte tiun malfortan flankon por diri: „vidu, oni Vin kredigas, ke la lingvo estas bone konstruita, kapabla esprimi ĉiun bezonon aŭ penson, sed provu, ekzemple, traduki tion ĉi . . . kaj Vi baldaŭ estos konvinkita, ke la sistemo ne estas bona. Tiel, danke malbonan prezenton, Via afero ne sukcesos. Vi entreprenas bataladon tre malfacilan; Vi volas aligi al Vi militistojn: pensu do antaŭe pri la armiloj kaj ne risku malvenkon el ne sufiĉa armaĵo aŭ el rapidegeco.“ Kaj tiuj ĉi ankaŭ konkludis, dirante: „Faru lernolibron, kiu donus plenan materialon por ellerni la lingvon, kaj tiam, sed nur tiam, ne timante pli malamikan ridadon, entreprenu propagandon publikan. Alie Vi riskus, ke mokado (tiel potence en Francujo) mortigu Vin je Via afero, aŭ ke la apatio de la plejmulto por ĉia ellerno, eĉ la plej facila, pretokstu, ke Esperanto postulas tro da laboro, por ne veni al Vi“. Mi konfesas, ke tiuj argumentoj estis jam konformaj je mia intima penso. Mi decidis sekvi la donitan konsilon kaj prokrasti la efektivigon de mia plano ĝis la „Manuel“ estos eldonita. Sed se mi haltigis la propagandon publikan, mi daŭrigis la privatan. Ĉien, kie mi povis, mi disĵetis la bonan semon, kiu por kreski atendas nur la superverŝon de l' Poŝa Lernolibro, dononta al ĝi la necesan akvon. Tre multaj personoj efektive promesis al mi ellerni la lingvon tuj kiam la libreto estos publikigita. Kelkaj el ili ĝin atendas senpacience kaj ŝajnas tute pretaj fariĝi apostoloj de la ideo. Ĉetere, mi estas absolute certa, ke nia lingvo renkontos tre favoran akcepton en Francujo. Mi preparis artikolon de vastigado, en kiu mi sciigas la eliron de l' libreto, la ekzistadon de nia gazeto kaj la praktikan uzon de l' folieto-vortaro. Nature mi instruas la leganton pri la naturo, simpleco kaj nekredebla facileco de la lingvo kaj ankaŭ pri ĝia stato de disvastigo en la mondo. Mi donas mian adreson por la „Manuel“, la aliaj verkoj aŭ eĉ la abono de nia gazeto. Tiun ĉi artikolon mi sendos, iom post iom, al ĉiuj ĉefaj redaktoroj de francaj ĵurnaloj, en Francujo kaj aliloke. Mi estas tute decida elyoki senĉesan movadon de opinio ĉirkaŭ nia ideo, per la plumo kaj eĉ per paroladoj, se mi povos trovi tempon por tiu ĉi lasta afero Tre volonte mi korespondus kun niaj diversaj amikoj en la mondo, sed mi havas tiel malmulte da tempo, ke mi ne kuraĝas enskribigi min en la klubon de korespondado. Tamen se tiu aŭ alia el ili volas skribi al mi, li tre bone povas, kaj mi respondos kun granda plezuro, se ne ĉiam kun rapideco.

La juĝo de Zeŭs.

Fablo greka de H. Sienkiewicz.

Unu fojon, en vespero, sur la rokoj de l'Pnikso renkontis sin Apollo kaj Hermes kaj, ekstarinte sur la rando de roka pendaĵo, rigardadis Atenojn.

La vespero estis belega; la suno jam estis ruliĝinta de l'Arĥipelago al la maro Jona kaj subakvigadis malrapide sian radian kapon en la turkisan, glatan akvegon. Sed la suproj de l'Himeto kaj Penteliko lumis ankoraŭ, kiel superverŝitaj per fandita oro, kaj ekster tio sur la ĉielo estis la ruĝo vespera. En ĝiaj briloj dronadis la tuta Akropolo. La blankaj marmoroj de la Propileoj, de l'Partenono kaj Ereĥtejono, ŝajnis esti rozaj kaj tiel facilaj, kiel se la ŝtono estus perdinta ĉian pezon, aŭ kiel se ili estus sonĝa montriĝo. La pinto de la ponardego de la giganta Atene-Promaĥos flamis en la ĉielruĝo, kiel torĉo ekbruligita super Attiko.

Sur la ĉielo balanciĝadis sur la disfalditajflugiloj kelkaj akcipitroj, kiuj flugis por la nokto al la nestoj, kaŝitaj en la rokoj.

La homoj revenadis amase de la kampaj laboroj al la urbo. Sur la vojo de l'Pireus iris muloj kaj azenoj, portante pendigitajn sur la flankoj korbojn plenajn de olivoj aŭ de ora vinberaĵo; post ili, en ruĝaj nuboj da polvo, iris la kaprinoj tordokornaj — antaŭ ĉiu kaprinaro kapro blankabarba, sur la flankoj hundoj akrasentaj, poste paŝtisto, ludanta je fajfilo aŭ maldika pajleto avena.

Inter la brutaroj moviĝadis malrapide antaŭen veturiloj, portantaj la dian avenon, tiritaj de bovoj maldiligentaj; tie kaj ie preteriradis taĉementoj da hoplitoj vestitaj en kupro, rapidantaj por la nokta gardo al la Pireus aŭ al Atenoj.

Malsupre la urbo bolis ankoraŭ per vivo. Apud granda fontano, kuŝanta proksime de Poikile, junaj knabinoj, vestitaj en blankaj vestoj, ĉerpadis akvon, kantante, ridante laŭte, aŭ defendiĝante de la knaboj, kiuj ĵetadis sur ilin katenojn, plektitajn el hederoj kaj branĉoj vinberaj. Aliaj ĉerpinte jam akvon, kun amforoj apogitaj sur la ŝultro kaj mano levita supren, iris la domojn, facilaj kaj graciozaj, similaj al nimfojsenmortaj.

Delikata venteto, blovante de la ebenajo attika, alportadis al la oreloj de la du dioj la rezonojn de rido, de kantoj kaj kisoj.

La „Malproksime-trafanta“ Apollo, por kies okuloj nenio sur la ĉielo estis pli aminda ol virino, turniĝis al la „Argon-detruinto“ kaj diris:

— Ho filo de Maja, kiel belaj estas la Atenaninoj!

— Kaj virtaj, mia Radiulo — respondis Hermes — ĉar sub la zorgo de Pallas ili restas.

La arĝentarka dio eksilentis kaj rigardis kaj aŭskultis plue. Dume la ĉielruĝoj malrapide estingiĝadis, la movo iom post iom ĉesadis; la Seitaj sklavoj fermis la pordegojn kaj fine fariĝis mallaŭte. La nokto ambrozia ĵetis malluman, ornamitan per steloj kurtenon sur la Akropolon, la urbon kaj la ĉirkaŭaĵon.

Sed la krepusko ne daŭris longe. Baldaŭ el la Arĥipelago elnaĝis la pala Selene kaj komencis veladi kiel arĝenta ŝipeto sur la ĉiela vastaĵo. Kaj rec lumiĝis la marmoroj sur la Akropolo, nur ili lumis nun per klar-verda lumo kaj estis ankoraŭ pli similaj al sonĝa apero.

— Oni devas konfesi — diris la „Malproksime-trafanta“ — ke Atene miregindan al si elektis sidejon.

— Ha! saĝa ŝi estas! Kiu do povis pli bone ol ŝi elekti — respondis Hermes. — Ĉe tio Zeŭs havas mirindan al ŝi malfortecon. Ŝi bezonas nur, petante pro io, karesi lin sur la barbo, tuj li eknomas ŝin sia Tritogeneja, ĥilineto amata, ĉion li promesos kaj ĉion per klino de kapo permesos.

— La Tritogeneja enuigas min iatempem! ekmurmuris la filo de Latona.

— Ankaŭ mi rimarkis tion, ke ŝi fariĝas nun enua! — respondis Hermes.

— Kiel maljuna peripatetiko. Kaj ĉe tio ŝi estas ankaŭ virta ĝis abomeuo, tute, kiel mia fratino, Artemis.

— Aŭ, kiel ŝiaj propraj servantinoj, la Atenaninoj.

La Radiulo turniĝis al la Argon-detruinto:

— Jam la duan fojon vi rememorigas, kiel intence, pri la virto de la Atenaninoj. Ĉu ili vere estas tiel konstantaj?

— Fable, ho filo de Latona!

— Efektive! — diris Apollo. — Kaj ĉu vi pensas, ke estas en tiu ĉi urbo eĉ unu virino, kiu kontraŭstaras al mi?

— Mi pensas, ke jes!

— Al mi, al Apollo?

— Al vi, mia Radiulo!

— Al mi, kiu ŝin katenos per la poezio, sorĉos per la kanto kaj muziko?

— Al vi, mia Radiulo.

— Se vi estus honesta dio, mi estus preta veti. Sed vi, Argon-detruinto, se vi perdos, vaporigos tuj kune kun viaj sandaloj, kun via bastono, kaj mi vin ree ne ekvidos!

— Ne. Mi metos unu manon sur la teron, la duan sur la maron kaj ĵuros per la Hades. Tian ĵuron tenas ne sole mi, sed eĉ la membroj de l' magistrato en Atenoj.

— No! Tion vi ree troigas. Sed bone! Se vi perdos, vi devas liveri sur Trinakia'n aron da longakornaj bovoj, kiujn vi ŝtelos, ĉe kiu plaĉos al vi, tiel, kiel en sia tempo, estante ankoraŭ knabeto, vi ŝtelis miajn brutarojn sur Pieria.

— Konsento. Kaj kion mi ricevos, se mi gajnos?

— Elektu, kion vi volas.

— Aŭskultu min, Malproksimen-trafanto, mi estos sincera kun vi, kio, kiel vi scias, ne ofte okazas al mi. Unu fojon, sendita de Zeŭs, mi jam ne rememoras en kia afero, mi transflugadis ĝuste super via Trinakia, kaj ekvidis Lampecia'n, kiu kune kun Featuza gardas tie viajn brutarojn. De tiu ĉi tempo mi ne havas trankvilon. Lampecia ne eliras al mi el la okuloj, el la memoro, mi amas ŝin kaj sopiras al ŝi tagon kaj nokton. Se mi gajnos, se troviĝos en Atenoj virino tiel virta, ke ŝi kontraŭstaros al vi, vi donos al mi Lampecia'n. Nenion pli mi postulas.

La Argentarka komencis balanci la kapon.

— La amo do scias ennestiĝi eĉ en la koro de la patrono de komercistoj! Sed tre volonte. Mi donos al vi Lampecia'n, tiom pli, ke ŝi nun ne povas vivi harmonie kun Featuza. Parolante en parentezoj, ambaŭ estas enamiĝintaj en min kaj pro tio ili sin reciproke insultas.

Granda ĝojo ekradiis el la okuloj de l' Argon-detruinto.

— Sekve la veto staras — li diris. — Nur ankoraŭ unu: la virinon, super kiu vi volas ekprovi vian dian forton, mi mem al vi elektos.

— Se ŝi nur estas bela!

— Ŝi estos inda je vi.

- Konfesu, ke vi jam ian elserĉis.
- Mi konfesas.
- Virgino, edzino aŭ vidvino?
- Komprenoble, edzino. Fraŭlinon aŭ vidvinon vi povus gajni al vi per la promeso de edzinigo.
- Kia estas ŝia nomo?
- Erifila. Ŝi estas edzino de bakisto.
- De bakisto? — demandis nekontente la Radiulo — tio ĉi plaĉas malpli al mi.
- Kion do vi volas! mi en tiuj rondoj la plej ofte turniĝas . . . La edzo de Erifila nun ne estas en la domo; li forveturis Megara'n. Tiu ĉi bakistedzino estas la plej bela virino, kiu iam paŝadis sur la patrino tero.
- Mi estas scivola.
- Ankoraŭ unu kondiĉon, mia Arĝentarka. Promesu al mi, ke vi uzos nur rimedojn indajn je vi kaj agos en nenia okazo, kiel agus ekzemple tia maldelikatulo, kiel Ares, aŭ eĉ, parolante inter ni, kiel agadas nia komuna patro, la Nubojn-kolektanto.
- Por kiu vi min havas! — diris Apollo.
- Sekve ĉio estas priparolita kaj mi povas al vi montri Erifila'n.
(Fino venos.)

El la mondo.

Konsola klarigo. Kun riĉa prava materialo en la mano antaŭ nelonge profesoro d-ro Heim parolis publike en la Svisa Alpa Klubo en Zuriĥo pri morto, kaŭzita de falo en montajn profundaĵojn. Laŭ la opinio de la parolanto la impresoj, tra kiuj pasas homo pereanta en tia maniero, multe diferencas de la impresoj kiujn oni ordinare supozas por tiaj okazoj; laŭ la opinio de la publiko tia morto estas terura. Estas vero, ke la mortintoj siajn impresojn rakonti al ni ne povas; sed ekzistas ankaŭ tiaj personoj, al kiuj prosperis en la lasta minuto sin savi de preskaŭ certa morto, kaj tiuj ĉi trairis impresojn tute tiajn samajn, kiujn devis trairi la mortiĝintaj. Profesoro Heim, kiu de multaj jaroj okupas sin je tiu ĉi demando, fondas sian opinion sur longa serio da observoj, faritaj tiel en la montoj, kiel ankaŭ sur la kampo de batalo, en katastrofoj de fervojo, de fabrikoj, kaj ankaŭ en okazoj en sia propra vivo. La falanta en profundaĵon sentas nenian doloron, nek teruron. Li plene konscias la situacion, en kiu li sin trovas. En la daŭro de 2—10 sekundoj tra lia cerbo traflugas tiom da pensoj, ke en tuta horo li ne povus ilin rakonti. La kapablo de pensado grandiĝas eksterordinare. En multaj, preskaŭ en ĉiuj okazoj havas lokon subita, fulma returno de la pensoj en la estintecon. Ĉiuj stadioj de la vivo venas vice antaŭ la okulojn. Poste eksonas en la oreloj iaj melodiaj kvietaj tonoj, ĝis fine venas tomba silento: tio ĉi estas la perdo de la konscio. Oni aŭdas frapon de la korpo, sed oni ĝin ne esploras, ne sentas. Tio sama havas lokon sur la kampo de batalo: oni ne sentas la eniron de la kuglo en la korpon, kaj nur la fluo de sango aŭ la paraliĝo de ia membro de la korpo turnas la atenton de la soldato sur la ricevitan vundon. La falantaj en profundaĵon, rompinte manon aŭ piedon, sciiĝas pri tio ĉi nur tiam, kiam ili provas sin levi. Sendube tie ĉi efikas forta incito de la nervoj, kiu hipnotizas ĉiun doloron. D-ro Heim finas per la sekvantaj vortoj: „Kiu pereas sur la fundo de monta profundaĵo, pereas per bela morto.

Puraj, grandaj pensoj plenigas lian cerbon; tute sen ia doloro li flugas en la bluan malplenajon. Nur por ni, restintaj, tia morto ŝajnas io terura; sed la certeco, ke ĝi apartenas al la kategorio de la plej facilaj, devas nin konsoli.“

Ĉikago, la areno de la plej proksima ekspozicio tutmonda, en diversaj rilatoj turnas sur sin la komunan atenton. Al la Eŭropanoj, kiuj kutimis je malrapida naskiĝo de urboj, estas tre malfacile kredi, ke Ĉikago ne ekzistis ankoraŭ antaŭ sesdek jaroj. Kaj tamen tiel estas. Kiel certigas la konata amerika geografo d-ro Steffens, ĝis la jaro 1833 Ĉikago estis malgranda kolonio, havanta 550 loĝantojn kaj 175 parterajn dometojn. Nur de la tempo, kiam la Amerika registaro aĉetis la ŝtatojn Indiana, Miĉigan kaj Illinois de la Indianoj por 4½ milionoj frankoj, komenciĝas la kresko de la nun jam potenca urbo, kiu en la jaro 1850 havis jam 29,963, en 1860—109,206, en 1870—306,600, en 1880—491,516, en 1890—1,098,576 loĝantojn. Nun Ĉikago rilate la nombron de la loĝantoj estas la dua urbo en la Unuigitaj Ŝtatoj kaj rilate la belegecon de la konstruoj kaj stratoj okupas la unuan lokon sur la dua duonglobo. Dek-kaj dudeketaĝaj konstruoj, pretigitaj el kavernitaj brikoj kaj feraj traboj, estas tie renkontataj sur ĉiu paŝo.

Papero el fero. Jam en la jaro 1851 ĉe la unua angla tutmonda ekspozicio oni povis vidi paperon, kiu estis preparita el fero kaj povis esti uzata por skribado. Tiu ĉi ideo en la lasta tempo estas denove levita de kelkaj anglaj fabrikantoj de fero, kaj naskiĝis viva konkurenco en preparado de fera papero, ĉe kiu la plej grava indo estos la eble plej granda maldikeco de la papero. La plej perfektan gradon atingis ĝis nun unu speco de fera papero, kiu havas la dikecon de 1800-a parto de angla colo, t. e. 1800 folioj da fera papero metitaj unu sur la alia havas ĉiuj kune la altecon de unu colo. La mirinda delikateco de la nova skriba materialo estas tiom pli frapanta, kiam oni memoras, ke nur 1200 folioj de la plej maldika efektiva papero el materialo ĝisnuna havas iom pli ol unu colon. La nova fera papero estas eksterordinare glata, kaj oni povas tre facile skribi sur ĝi, kvankam ĝi montriĝas pora (poroza), kiam oni tenas ĝin kontraŭ la lumo.

La superverŝado de ĉambraj kreskaĵoj per varma akvo estas tre bona. En vintro oni devas uzi absolute nur tian; sed ankaŭ en somero ĝi estas tre utila por la prospera disvolviĝado de la kreskaĵoj. La akvon oni povas varmigi ĝis 30° R. Malsanajn kaj duone velkintajn kreskaĵojn oni povas eĉ en multaj okazoj per superverŝo per varmega akvo denove resanigi.

Petrolaj lampoj brulas malbone: 1) kiam la meĉo estas ne rekte detranĉita; 2) kiam la cilindro ne estas konforma; 3) kiam la meĉo estas tro malnova. La meĉon oni devas detranĉi nur unu fojon en semajno; en la ceteraj tagoj sufiĉas la deviŝado per ĉifoneto. Netaŭga estas ĉiu cilindro, kiu havas tro altan kloŝon, t. e. ĉe la mallarĝa parto komenciĝas tro alte. La mallarĝiĝo de la cilindro devas esti ne pli ol 2 centimetrojn super la rando de la meĉingo. Malaltigi la flamon de petrola lampo por ŝpari petrolon estas kalkulo tute malbona. Rilate la meĉon mem estas konsilinde renovigi ĝin ĉiujn tri monatojn, ĉar post tiu tempo ĝi dank' al la enpenetranta malpurajo pli ne suĉas.

Historia tablo. Archibald Forbes, konata korespondanto de kampoj de batalo, publikigis antaŭ nelonge en la „Nineteenth Century“ kelkajn rememorojn el la batalo apud Sedano. Li noktis en tiu sama ĉambro

en la kastelo Bellevue kaj en tiu sama lito, en kiu Napoleono ripozis en la antaŭirinta nokto antaŭ ol oni forkondukis lin al Wilhelmshöhe. Forbes tie skribis siajn glorajn korespondojn por la „Daily News“ sur granda tablo de mango. „Ni ne havis, kion mangi“, li rakontas, „mia kolego komencis ĉirkaŭmordeti oston de ŝinko, kiu sola preskaŭ restis de ĉiuj niaj provizoj de nutraĵo. Ne multe da viando li trovis sur ĝi, kaj baldaŭ li kun malbena ĵetis la oston sur la tablon kaj la ostoj trafis en nian inkujon, renversis ĝin kaj elverŝis la inkon. Kiam post kelkaj monatoj mi denove estis en Bellevue, oni kun granda seriozeco montris al mi grandan makulon sur la tablo kaj klarigis al mi, ke tiu ĉi makulo naskiĝis en la tempo de la subskribado de la Sedana kapitulacio. Ĝin kvazaŭ faris Wimpffen, renversante la inkujon en atako de indigno kaj honto. Mia kondukanto aldonis, ke por la tablo kun la historia makulo oni proponis jam fablajn sumojn, sed ke la posedanto por neniam trezoroj volas ĝin fordoni. Tiel naskiĝas“, diras Forbes, „memorajoj historiaj.“

Ekspedicio al la poluso. La norvega vojaĝanto Nansen havas nun en Anglujo tutan serion da publikaj paroloj pri la nova ekspedicio al la norda poluso, kiun li intencas entrepreni en la venonta jaro. Nansen elveturos el Norvegujo en Januaro de 1893 kaj direktos sin antaŭ ĉio al la enfluo de Lena, de kie li venos Genlandujon de la dua flanko de la poluso. La kuraĝa vojaĝanto prenas kun si sur la ŝipo provizojn de nutraĵo por ses jaroj, kvankam li supozas, ke la ekspedicio ne okupos pli ol 3—4 jarojn. La ŝipanaro, kunmetita el dekdu ŝipanoj, havos vivon efektive monaĥan. Alkoholo en ĉia formo kaj tabako estos absolute elpelitaj el la ŝipo, kaj malgranda kvanto da spirituso estos kunprenita sole por celoj sanigaj. La ekspedicio prenas kun si balonon, tendojn kaj speciale de Nansen elpensitajn ŝipetojn por la okazo, se la ŝipo, havanta la amplekson de 200 tonoj, estus difektita per la puŝoj de la glacio.

Miliardo da minutoj. Kiam en la jaro 1818 estis levita la penso asigni por la francaj emigrantoj miliardon da frankoj, la generalo Fois, sur konsilio analizanta tiun ĉi aferon, ekkriis: „Miliardo da frankoj? Ĉu Vi scias, kiom ĝi estas? Ĉu ne venis al Vi en la kapon, ke de la naskiĝo de Kristo ne pasis ankoraŭ miliardo da minutoj?“ Kvankam de la momento, kiam tiuj ĉi vortoj estis diritaj, pasis jam pli ol duono da centjaro, tamen de la komenco de nia ero ne pasis ankoraŭ miliardo da minutoj. Tio ĉi fariĝos ne pli frue ol en la jaro 1902.

Trezoroj en la maro. Al unu el la konataj filantropoj-financistoj en Vieno venis antaŭ nelonge unu malriĉa studento kaj proponis al li, ke por 5 guldenoj li malkaŝos al li fonton, al ĉiu atingeblan, de grandegaj provizoj da arĝento, havantan la indon de pli ol 1200 bilionoj da arĝentaj guldenoj. La bankisto ŝercante respondis, ke li estas preta akcepti la proponon, se ĝi estas fondita sur vero. „Jam antaŭ cent jaroj“, diris la studento, „la ĥemiisto Proust malkaŝis en la mara akvo arĝenton. Malaguti kaj aliaj okupis sin je la elkalkulado de la proporcio de la metalo en la akvo kaj trovis, ke en unu kuba metro de la mara akvo sin trovas 10 miligramoj da arĝento, sekve 100,000 kubaj metroj da akvo enhavas unu kilogramon de la kara metalo. Plu unu kuba kilometro, enhavanta 1,000 milionojn da kubaj metroj da akvo, donas 10,000 kilogramojn da arĝento, el kiu oni povas pretigi 900,000 arĝentajn guldenojn de Aŭstrujo. La maroj kaj oceanoj de nia tero sin etendas sur 374 milionoj kvadrataj kilometroj da supraĵo, ĉe mezonombra profundeco de 4 kilometroj; ili sekve enhavas tutajn 1,500 milionojn

kubajn kilometrojn da akvo, en kia sia trovas 1,350 bilionoj arĝentas guldenoj.“ Al la bankisto plaĉis la kurioza elkalkulo, kaj la studento ricevis siajn 5 guldenojn.

La fumado en Meksiko. Aparta rekompenco por diligentaj infanoj en la lernejoj de Meksiko konsistas en tio, ke ili ricevas la permeson fumi cigaron en la daŭro de instruado en la ĉambro de la lernado. De tempo al tempo kompreneble okazas, ke la instruanto volas esprimi al la tuta klaso sian kontentecon kaj permesas la fumadon al ĉiuj lernantoj. Sinjoro la instruanto, kiel efektiva meksikano, tenas kompreneble en la daŭro de la tuta instruado en la buŝo grandegan cigaron konforman al lia indo. Sur la katedro antaŭ li staras ankaŭ kruĉo da meksika vino, pri kies ĉiutage renovigata enhavo zorgas la gepatroj de la lernantoj. Ankaŭ en la meksikaj salonoj de juĝo oni preskaŭ ĉiam fumas, kaj ofte okazas, ke malfacila krimulo sidas sur la benko de juĝatoj kaj, fumante cigaron kun vere hispana fiereco, donas siajn respondojn al la juĝantaro aŭ akceptas la juĝan decidon.

Por ke petrola lampo brulu pli lume kaj pli pure, oni devas meti en la naftujon sur unu funton da nafto kafan kulereton da plej malgrandpeca, bone tralavita ordinara salo.

Por ke fero ne rustiĝu, oni devas ĝin varmigi tiel, ke oni ne povu ĝin teni en la mano, kaj poste froti per pura blanka vakso. Poste oni devas denove ĝin varmigi kaj, kiam la vakso malaperos, viŝi la feron per peco da drapo aŭ ledo, por redoni al ĝi la antaŭan brilon.

Por enfortikigi feron en ligno, oni devas, antaŭ ol oni enmetas la feran objekton en la truon, faritan por tio ĉi en la ligno, enguti en tiun ĉi truon iom da forta solvo de amoniaka salo; la fero rustiĝas de tiu ĉi lasta kaj, ricevante pli grandan amplekson, pli fortike alpremiĝas al la ligno.

Por rapide moligi en kuirado malmolan viandon: Kiam la viando estas deŝaŭmita kaj sin trovas en forta bolado, oni enverŝu pli malpli sur 3 fuutojn da viando du kafajn kuleretojn (sed ne pli) da bona greua brando. La viando molas, kaj de la odoro de la brando restas neniam postesigno.

Bagateloj.

Napoleono III kaj Benedetti. Napoleono III ofte mokadis siajn kortegulojn. Tiel li diradis al Benedetti, lia konata ambasadoro, ke li havas bovan vizaĝon. „Mi ne scias, Via Imperiestra Moŝto“, respondis unu fojon Benedetti al tiela ŝerco, „ĉu mi efektive havas vizaĝon de bovo, sed mi tre bone scias, ke mi multajn fojojn prezentadis Vian personon, kaj ĉiam kun tiu ĉi sama vizaĝo, kiun mi nun havas. [I. Lojko.]

Neantaŭvidita respondo. Unu provincano, veninte Romon turnis al si la atenton de ĉiuj per frapanta simileco kun la imperiestro Aŭgusto. Tiu ĉi ordonis, ke oni alkonduku al li la similulon kaj, rigardante lin atente, li diris: „Junulo, ĉu via patrino neniam estis en Romo?“ — „Ne, Sinjoro“, respondis la provinculo, „sed mia patro ofte tie ĉi estadis.“ [I. Lojko.]

Kulereto. En bona restoracio estas granda amaso da homoj, kiuj manĝas kaj trinkas. Apud du tabletoj, proksime de la enirejo sidas du sinjoroj: unu jam neĵuna kun friponeta vizaĝo; antaŭ li, sur la tablo staras malplena glaseto kaj telero kun duono da pantranĉo kun ŝinko;

la dua — juna homo, dande vestita, videble ĵus sidiĝinta apud la tableto; li detiris siajn ŝamajn gantojn kaj disbutonumas la superveston. La nejuna sinjoro legas gazeton kaj de post ĝi li de tempo al tempo ĉirkaŭrigardas la publikon. „Servanto!“ vokas la juna dando: „tason da kafo kaj dolĉan pasteĉeton!“ Post kelkaj minutoj la servanto alportis. La juna homo komencas trinki la kafon, rigardas ĉirkaŭen sur ĉiuj flankoj kaj subite kaŝas la kulereton de sia kafo en la poŝon. Tion ĉi rimarkis la maljuna sinjoro. Li vokas la servanton. Tiu ĉi aperas. „Tason da kafo kaj dolĉan pasteĉeton! La postulitaĵo estas alportita. La sinjoro manĝas. „Se vi volas, mi montros al vi ĵonglon“, li diras al la servanto, alvokinte lin. La servanto ridetas. „Rigardu: ĉu tio ĉi estas kulereto?“ — „Jes, sinjoro.“ — „Kie do ĝi estas nun?“ demandis la sinjoro, rapide kaŝante la kulereton en la poŝon. — „En Via poŝo.“ — „Ne, ne en mia, sed en la poŝo de tiu ĉi juna sinjoro.“ La servanto, senvole returnas sin al la dando. Tiu ĉi suprensaltas. „Volu, sinjoro, elpreni la kulereton el Via poŝo“, turnas sin al li la nejuna homo. Vole-nevole la dando enŝovas la manon en la poŝon kaj eltiras la kulereton. „Nu, Vi estas vera ĵonglisto!“ li rimarkas konfuzite. „Jes. Prenu por la kafo; la brando estas pagita“, diras la ĵonglisto, ĵetante moneron sur la tablon, kaj foriĝas, akompanata per salutoj de la mirigita servanto kaj forportante la kaŝitan kulereton. [I. Lojko.]

La poeto Pope. La angla reĝo, vidinte unu fojon sur la strato de Londono Pope'on, konatan poeton, sed ĝibulon, diris al sia sekvantaro: „Mi volus scii, por kio taŭgas tiu ĉi hometo, kiu iras tiel malrekte.“ Pope aŭdis tiujn ĉi vortojn kaj, turninte sin al la reĝo, li ekkriis: „Por igi Vin rekte iradi.“ [I. Lojko.]

Frideriko la Granda amis disputojn kaj havis la kutimon fini ilin per ekbato de piedo en la genuon de la kundisputanto. Unu fojon, havante fortan deziron disputi, li demandis unu kortegulon, kial li ne diras al li sian veran opinion. „Estas maloportune“, respondis tiu ĉi, „diri siajn opiniojn al reĝo, kiu havas tiajn fortikajn kovinkojn kaj tiajn solidajn botojn“. [N. B.]

Unu generalo demandis unu junan soldaton, ĉu estas sufiĉa por li la porcio da pano, kiun li ĉiutage ricevas. „Jes, Via generala Moŝto.“ — „Kaj eble io ankoraŭ restas?“ — „Jes, Via Generala Moŝto.“ — „Kion do vi faras kun la restaĵo?“ — „Mi ĝin formanĝas, Via Generala Moŝto.“ [N. B.]

Malkare prepari al si kopian inkon: Oni prenas ordinaran inkon, kiun oni havas por simpla skribado, enmetas iom da gumo araba (solvite) kaj iom da sukero, miksas ĝin kun la inko, kaj oni ricevas pretan kopian inkon.

Por forigi ĉiajn grasajn makulojn de papero, oni metas sur ĝin kaĉon el bruligita magnezio kaj purigita benzino. La maso ne devas esti tro maldensa. La makulitan lokon oni per tio ĉi singarde frotas kaj poste oni defrapas la kaĉon. Freŝaj makuloj malaperas tuj, malnovaj makuloj ofte nur post du- aŭ trifoja prilaboro.

Rusa oficiro, ricevinte de unu alilandulo elvokon al duelo, sendis al li kiel sekundanton unu sian kolegon. Oni prezentas al li la sekundanton de la kontraŭa flanko, malgrandan kaj tre dikan homon. „Cu Vi scias nian kutimon“, demandis la lasta, „ke se la batalantoj maltrafas, la sekundantoj devas batali?“ — „Mi konsentas“, respondis la oficiro. „Sed ĉu Vi scias“, daŭrigis la dika sekundanto, „ke mi sur

dudek kvin paŝoj trafas en kvinkopekan moneron?“ — „Mi ne scias“, respondis la oficiro, „ĉu mi trafos en tia interspaco en kvinkopekon, sed en tian ventregon, kiel Via, mi trafos sendube.“ [N. B.]

Malriĉa saĝulo tagmanĝis ĉe avara riĉulo. La avara forŝovis la panon sur la tablo tiel malproksime, ke la malriĉa gasto ne povis ĝin atingi. Ne estante ankoraŭ kontenta de tio ĉi kaj volante pli ĉagreni sian gaston, la avarulo turnis sin al li: „Mi aŭdis, ke Vi estas tre saĝa homo, sed mi vidas, ke Vi estas mallaborema: Vi volas, ke aliaj laboru, dum Vi mem sidas sur ili kiel parazito kaj manĝas kaj vestas Vin per fremda kosto. Se, kontraŭe, Vi estus laborema, Vi povus fariĝi io, ekzemple ĉe mi kaj miaj komercoj. „Ne, mia bonfarema“, respondis la saĝulo, „kontraŭe: mi volus io fariĝi ĉe Vi, sed Vi ne permesas al mi“ . . . „Klarigu Vin“, diris la avarulo, „ĉar mi Vin ne komprenas.“ — „Tute simple“, kun sarkasma rideto sur la lipoj respondis la saĝulo: „mi volis ĉe Vi fariĝi sata, sed Vi ne permesas al mi.“ [N. Kuŝnir.]

Kontraŭ la germana leĝo pri la drinkemeco kelkaj gajaj filoj de la Marburga universitato en unu nokto faris al si la plezuron skribi per kredo sur la nigra tabulo de la universitata konstruo la sekvantan sentenceon (en lingvo latina): „Kiu bone drinkas, tiu bone dormas, — kiu bone dormas, tiu ne pekas, — kiu ne pekas, estas bona homo, — sekve: kiu bone drinkas, estas bona homo!“ Kian grandegan gajecon tiu ĉi sentenco la sekvantan matenon elvokis ĉe la studentoj, oni facile povas al si prezenti. [K. Hübert.]

Oni demandis la filozofon Malebranche pri la kaŭzo de la suferoj de la bestoj. „Ke la homoj suferas, tio ĉi estas komprenebla: Adamo manĝis la malpermesitan frukton; sed por kio suferas la bestoj?“ — „Eble ili manĝis malpermesitan fojnon“, respondis Malebranche. [N. B.]

Jubilea telegramo. Mallongan tempon post la 25-jara jubileo de la tago de apero de „Guberniaj Skizoj“ de la rusa satiristo Ŝĉedrin-Saltikov havis lokon la ĉiujara kolega tagmanĝo de la studentoj de la N...a universitato. Unu el la alestantoj proponis, ke oni esprimu al la talenta satiristo la studentan gratulon je la pasinta jubileo. Lia ideo estis unuvoĉe akceptita kaj tuj estis kunmetita telegramo kun konvena teksto kaj kun la komuna subskribo: „ĉiujare-tagmanĝantaj studentoj.“ Post unu horo de Ŝĉedrin venis respondo: „Dankas! Ĉiutage tagmanĝanta Ŝĉedrin.“


Fortaj konvinkoj. Kiam Napoleono I forlasis la insulon Elbo kaj aliradis al Parizo, la Pariza gazeto „Moniteur“ per la sekvantaj esprimoj sciigis pri tio ĉi siajn legantojn: (tago 1): La malbenita hommanĝanto eliris el sia nesto“; (tago 2): „La Korsika diablo forlasis la ŝipon en la golfo Juano“; (tago 3): „La tigro alvenis al Gano“; (tago 4): „La monstro pasigis la nokton en Grenoblo“; (tago 5): „La tirano trairis tra Liono“; (tago 6): „La uzurpatoron oni vidis en 60 mejloj de la ĉefurbo“; (tago 7): „Napoleono estos morgaŭ apud niaj fortikaĵoj“; (tago 8): „La imperiestro venis al Fonteneblo“; (tago 9): „Lia Imperiestra Moŝto enpaŝis hieraŭ en la palacon Tuilerian, ĉirkaŭita de siaj fidelaj regatoj.“

Inter geedzoj. La diablo prenu tian ordon! ĉiun fojon, kiam mi volas vesti novan ĉemizon, ĝi ĉiam estas sen butonoj! — Kiel vi ne hontas, grandaĝa viro, tiel brui pro kelkaj mankantaj butonoj! Rigardu la infanojn: ĉe ili la tutaj vestoj estas disŝiritaj, kaj ili ne diras eĉ unu vorton.

Problemo de ŝako N-ro. 5

de F. Dubbe.

Nigro



Blanko komencas kaj donas maton per la 2a iro.

Solvo

de la problemo de ŝako No. 3:

I.

Nigro: —
Blanko: D.d7—f7

II.

kiel li volas.
donas maton laŭ la iro de nigro.

Prescraro. En la problemo de ŝako N-o 3 sur e6 anstataŭ la erare presita kuriero devas stari ĉevalo.

Ĉarado.

Pronom' estas mia silabo unua;
Pronom' estas mia silabo la dua;
Partet' estas mia silabo la tria;
Estajon signifas la kvara la mia;
Kaj pri la tutaĵo kredeble Vi dirus:
"Ila, mi ĝin sendube volonte akirus!"
(Solvo en la sekvanta numero.)

Solvo

de la enigmo en N-o 4:

La litero "m".

Respondoj al la amikoj.

Al s-ro V. L. La pronomoj "li" kaj "ŝi" estas uzataj nur por personoj; por aferoj, objektoj kaj ankaŭ por bestoj ni uzas la pronomon "ĝi", ĉar en tiaj okazoj la sekso ne ekzistas. Se ni tamen, parolante pri objektoj aŭ bestoj, volas esprimi difinitan sekson (viran aŭ virinan), tiam ni povas uzi "li" kaj "ŝi".

Al s-ro . . . Vi diras: "pli bone propra kia ajn felo ol la malpropra eĉ de zibelo." Vere, sed ne ĉiam. Se ni donos al niaj legantoj pecojn, kiuj havas nek ian intereson, nek bonan formon, tiam la legantoj tute ne estos al ni dankaj, ke ni donas al ili "felon propran". Versojn ni povas nur presi tiajn, kiuj havas jam mem bonan formon, ĉar se ni devas plibonigi la formon en rimaj versoj, ĝi estas afero tro malfacila kaj postulus pli da tempo, ol fari mem novajn versojn. Mi ne parolas tie ĉi speciale pri Viaj versoj (el kiuj kelkaj estas sufiĉe bonaj kaj povos [kun kelkaj ŝanĝoj] esti siatempe presitaj), sed pri la principo enkomune.

Al multaj abonantoj en Rusujo. Ni dissendas nian gazeton tute akurate; sed pro diversaj lokaj cirkonstancoj, kiuj kompreneble ne dependas de ni, Vi ofte ricevas la gazeton 2—3 semajnojn post ĝia eliro.

Novaj Esperantistoj. (Serio IV.)

- 1622. Andersson, C., relvojisto. Bergslagsbanan. Göteborg. Svedujo.
- 1623. Baese, Helene. Teatralnaja ulica. Dünaburg. Rusujo.
- 1624. Bayer, A., instruisto. Ulbering, poŝto Triftern. Bavarujo.
- 1625. Berg, O., relvojisto. Bergslagsbanan. Göteborg. Svedujo.
- 1626. Bogdanoviĉ, Boris. p. adr. P. Bogdanoviĉ. Realnoje Uĉiliŝĉe. Kremenĉug
- 1627. Broman, R., stud. dent. Tandlākareinstitutet. Göteborg. Svedujo. [Rusujo.]
- 1628. Burkov, M. St. Gerusi, gub. Elisavetpol. Rusujo.
- 1629. Carlsson, I. P., instruisto. Yxnö, St. Anna. Svedujo. [V. Langlet.]
- 1630. Dĵevanŝir, Dĵafur Kuli Bek. St. Gerusi, gub. Elisavetpol. Rusujo.
- 1631. Fredberg, Josef. Drottninggatan 1. Upsala. Svedujo.
- 1632. Germundssen, A., kontoristo. "Vulkans" kontor. Göteborg. Svedujo.
- 1633. Grodzki, S., inĝeniero. Ananjev, gub. Herson. Rusujo. [A. Ĉajkovskaja.]
- 1634. Gumelins, K., kontoristo. Gumperts boklada. Göteborg. Svedujo.
- 1635. Gusev, N. Razgulaj, 2-a klass. gimnazia. Moskva. Rusujo.
- 1636. Kallstenius, Elisabeth (naskita Soltaŭ), s-rino. Filipstad. Svedujo.
- 1637. Kihlberg, M., relvojisto. Bergslagsbanan. Göteborg. Svedujo. [V. Langlet.]
- 1638. Kindvall, H., kontoristo. Gumperts boklada. Göteborg. Svedujo.
- 1639. Liljengren, Anna, fraŭlino. Herrborum, Börrum. Svedujo. [V. Langlet.]
- 1640. Lindedal, A., studento. Silboholm, apud Götene. Svedujo.

1641. Matheson, T., stud. dent. Tandläkareinstitutet. Göteborg. Svedujo.
1642. Mattsson, Malin, fraŭlino. Karcholm, Rönö. Svedujo. [V. Langlet.]
1643. Mörner, Margareta, graŭino. Herrborum. Börrum. Svedujo. [V. Langlet.]
1644. Nylén, H., relvojisto. Bergslagsbanan. Göteborg. Svedujo.
1645. Ohlsén, O., inĝeniero. Byggnadskontoret. Göteborg. Svedujo.
1646. Petersson, A. L., relvojisto. Bergslagsbanan. Göteborg. Svedujo.
1647. Pfeiffer, M., stud. litt. p. adr. H. M. Winter, Prüm. Rheinprovinz. Germanujo.
1648. Priek, Robert, gymn. Grünhofsche Str. 8. Mitaŭ. Rusujo.
1649. Procopée, H., relvojisto. Bergslagsbanan. Göteborg. Svedujo.
1650. Sellin, M., relvojisto. Bergslagsbanan. Göteborg. Svedujo.
1651. Sidorov, N., Razgulaj, 2-a klass. gimnazia. Moskva. Rusujo.
1652. Sjöstrand, M., stud. dent. Tandläkareinstitutet. Göteborg. Svedujo.
1653. Strömberg, W., relvojisto. Bergslagsbanan. Göteborg. Svedujo.
1654. Svobodov, S., Razgulaj, 2-a klass. gimnazia. Moskva. Rusujo.
1655. Turmann, Peter, Gymnasiast. p. Adr. Winter. Prüm. Rheinprovinz. Germanujo.

Anoncoj.

100 diversajn, uzitajn poŝtsignojn de Asio, Ameriko, Afriko kaj Aŭstralio sendos por 3 frankoj

Adolf König,
Schalke (Westfalen), Germanujo.

La plej necesa verko por ĉiu,

kiu volas ekkoni la lingvon Esperanto:

No. 11. „Dua libro de l'lingvo internacia“ (sistemaj ekzercoj). 50 Paĝoj.
Kosto 65 centimoj (= 25 kopekoj).

Tre grava por ĉiuj rusaj esperantistoj:

No. 41. „Plena lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj. Kun 2 vortaroj“ 75 paĝoj. Kosto: 1 ekzemplero 10 kopekoj; 25 ekzempleroj 2 rubloj.

Ĉiujn verkojn pri aŭ en la lingvo Esperanto (de kiu ajn eldonitajn) elsendas **L. Zamenhof** (Varsovio, str. Nowolipki No. 21). La nomaron kaj kostaron de la tuta literaturo Esperanta oni trovas en la libro No. 41. Kiu aĉetas por pli granda sumo, povas ricevi grandan rabaton.

F. Kürschner,

Kirschallee 218b, Thale a./Harz,
Germanujo,

deziras korespondadi kun esperantisto franca itala, hispana pro reciproka instruo en tiuj ĉi lingvoj.

Edzigo.

Sinjoro, Finlandano (32 jaroj), deziras sin edzigi kun fraŭlino ne pli maljuna ol 25 jaroj. Letero kaj fotografio al „Serĉanto“ poŝt-restante, Helsingfors, Finlando.

Fotografioj ne konvenantaj estos returnataj.

La libretojn 42, 43, 52, 53 dissendas por poŝtsignoj

W. H. Trompeter, Schalke,
Westfalen, Germanujo.

La presejo de W. Tümmel en Nürnberg,

de kiu tiu ĉi gazeto estas presata,
rekomendas sin por

ĉiuj presaj laboroj.